

La esperanta nacio (Romaoj, 2010)

Esperantistoj vivas dise en Eŭropo sen nacio kiun ilin unuigas. Same vivas naŭ ĝis dek ses milionoj da romaoj (aŭ ciganoj, se vi preferas la iom negativan sed pli tradician vorton). Al Eŭropo romaoj prezentas problemon, aŭ defion en la lingvaĵo de politikistoj. Unuflanke, ili vere enkorpiĝas la Eŭropan filozofion, vojaĝante de lando al lando, kaj parolante siajn gepatrajn lingvojn kaj la diversajn ŝtatajn lingvojn de la Eŭropa Unio. Aliflanke, dudek jarojn post la fino de la komunismaj registaroj en la orienta kaj centra Eŭropo, romaoj daŭre ne integriĝas kun la lokaj popoloj.

Por tio en Eŭropo eĉ ne mankas mono. Estas tiom da fondusoj, ke la avara Rumanio eĉ ne povos plene uzi la monon, kiun Eŭropa Unio pretas doni. Inter 2007 kaj 2013 ĉirkaŭ 13 miliardoj da eŭroj de la Eŭropa Socia Fonduso estos elspezitaj por integriĝo de romaoj kaj aliaj grupoj en malfacilaj sociaj situacioj. La mono celas faciligi aliron al loĝejoj, edukado, trejnado kaj laboro. “Mankas ne mono, sed la bona vojo ĝin uzi”, — agnoskas funkciulo en Bruselo.

Laŭ la burokrata tradicio de Bruselo, eŭropaj funkciuloj nun kontraktas bone pagatajn eksterajn fakulojn por studi la problemon kaj emfazi la plej efikajn projektojn kaj strategiojn.

La franca ŝtata sekretario respondeca pri eŭropaj aferoj Pierre Lellouche ĉi-somere atakis Bruselon pro — laŭ li — mankanta efikeco spite al troa elspezo de mono pri integrigaj strategioj. Li petis de Belgio, kiu nun prezidas EU, kaj de aliaj membro-ŝtatoj urĝan debaton pri integriĝo de romaoj. La franca politikisto kritikis problemojn de la junulara krimeco kaj la trafiko de infanoj kaj junuloj. Lellouche ankaŭ kritikis la alvenon en Francio de “homoj kiuj ne volas integriĝi en socio” kaj ties malemon respondi por si mem.

Francaj politikistoj rimarkigas, ke, ekzemple, Bulgario, Rumanio kaj Slovakio malsukcesis starigi efikan politikon por integriĝi romaojn kaj faciligi al ili laborpostenojn, loĝejojn kaj sociajn rimedojn por partopreni la “normalan” vivon.

Ankaŭ en Bruselo oni komentas ke orient- kaj centreŭropaj ŝtatoj ne profitas de la eŭropaj financaj ebloj por kunlabori kun romaoj kaj iliaj asocioj. Evidente, Rumanio estas la plej malbona en la klaso. Estas ĉirkaŭ 2 milionoj da romaoj en Rumanio, kvankam la registaro en Bukareŝto insistas pri nur 537 mil romaoj. Aliaj landoj kun grandaj romaaj komunumoj estas Slovakio (500 mil) kaj Bulgario (750 mil).

“Rumanio ne faris sian laboron, — klarigis romaa aktivulo Ciprian Necula al unu el la raraj francaj ĵurnalistoj. kiuj enketis en Rumanio mem pri la situacio de romaoj. — La ŝtato permesis flori al homa trafiko kaj prostituado kaj surpapere kreis kelkajn projektojn celante kontentigi eŭropanojn”.

Ĉi-somere la franca prezidanto Nicolas Sarkozy instigis al la detruado de ĉ. 500 neleĝaj romaaj tendaroj en Francio. Francio estas la plej elstara ekzemplo de kontraŭromaa politiko, sed ne la sola. Italio en 2008 eligis milojn da romaoj al Rumanio kaj Bulgario. Tia politiko daŭras. Ankaŭ Germanio, Danlando kaj Svedio plu resendas “hejmen” milojn da romaoj, precipe al Kosovo, kie ili frontas diskriminacion, terurajn vivokondiĉojn kaj senesperon. “Estas klara kaj sistema programo de EU-registaroj celanta romaojn”, — diras Anneliese Baldaccini, advokato ĉe Amnesty International en Bruselo.

“Malriĉeco, diskriminacio kaj aro da aliaj aferoj faris neeltenebla la vivon de romaoj en iliaj gepatraj landoj”, — diras Robert Kushen, direktoro de la Eŭropa Centro por la Rajtoj de Romaoj

en Budapeŝto. Li alvokas, ke EU sekurigu por romaoj la rajton de libera movado en la Unio.

Tamen ne ŝajnas, ke la Eŭropa Komisiono faros multe por protekti romaojn uzante la bazan rajton de libera movado. “La ebleco ellandigi la romaojn estas respondeco de la ŝtatoj-membroj”, — konstatas Matthew Newman, porparolanto de Viviane Reding, la eŭropa respondeculo pri justico. La ŝtatoj mem decidas kiel apliki la principon de libera movado. En aprilo ĉi-jara Reding mem agnoskis, ke la situacio de la romaoj eĉ plimalboniĝis.

Fonto : La Ondo de Esperanto. 2010. №8–9 (190–191), www.esperanto.org/Ondo/

Pri la lingva situacio de Romaoj en EU prelegis Nikola Rašić (Nederlando) dum EEU konferenco 2012 en Irlando:

Jen la raporto, sed ne lia prelego: www.europo.eu/documentloader.php?id=348&filename=eb-118-07-08-2012.pdf